

AVENO #42 - **Ekologio kaj Ekonomio**
en la retejo: Januaro - Decembro 2016

Ghenerala rimarko: pluraj informoj alvenas kun peticio - kompreneble plej multaj el ili ne plu estas aktivaj.

Do, bonvolu kontroli la daton, se vi intencas subskribi ian ajn peticion.

AVE: <http://www.verdujoj.org> ,

novaj artikoloj trovighas je la enirpagho, krome - vidu la butonojn maldekstre ...

La teksto estas lau la dato; bonvolu serchi temojn lau via intereso:

==

2016-12-06 La 7-era vojo al Daurigebla Estonteco

Caroline kunmetis la aktualajn plej-bonajn metodojn de ekologia ekonomio, en plena respekto al la alia vivantaro, kaj al la estonta vivantaro. Do, ne tro-uzi kaj ne el-cherpi la diversajn resursojn.

Shi opinis ke indus meti tiujn informojn sur la retejon de AVE; tion ni faras, kaj vi trovos la ligilojn, uzante la butonon „Ligoj“ che <http://verdujoj.org/ligoj.htm>
Bedaurinde la tekstoj estas en la angla, kaj ghenerale temas pri Usono - ofte kun internaciaj ligoj:

Rikolti la energion de la suno - kompleta gvidilo:

<http://www.improvenet.com/a/harness-the-power-of-the-sun-the-complete-guide-to-using-solar-energy>

Fotovoltaiko por la propraj domoj:

<http://www.homeadvisor.com/r/home-solar-panels/>

Komposti en ghardenoj - plibonigi la grundon:

<http://www.planetnatural.com/composting-101/>

Konsiloj por ekologie afablaj klas-chambroj (kaj ankaŭ oficejoj) en 24 eblecoj:

<https://www.populationeducation.org/content/24-ways-make-your-classroom-eco-friendly-year>

Studentaj praktikaj staghoj pri ekologio kaj medio-protekto, tie vi trovos ankaŭ subtenantojn (scholarships):

<http://www.fastweb.com/college-scholarships/articles/green-scholarships-internships-activities>

Imposto-repagoj dank al ekologie afabla renovigo de domoj:

<https://www.redfin.com/blog/2013/09/how-to-find-tax-rebates-and-incentives-for-green-home-improvements.html>

ekologio-rilataj laborpostenoj - jen: aparte por handikapitaj homoj:

<https://www.dol.gov/odep/pdf/GreenResourceGuide.pdf>

Caroline esperas ke tiuj informoj helpas krei bonan influon al la tutmondo.

I hope these resources help others make a positive global impact of their own!

Sincerely, Caroline

Caroline Hampton

<http://openeducators.org/>

500 Westover Drive #9372 | Sanford, NC | 27330

===

2016-12-01 **Rezultoj de COP-22 - Marrakesh, Klimato-pinto konferencaro**

Chi-foje pli rapide movighis la chefoj kaj parlamentoj de la plej gravaj por la klimata efiko landoj, char ili antaŭe ratifis Interkonsentigho de Parizo (COP 21). Ech la venonta prezidento de Usono, Trump, koncedis ke klimata shanghigo povus ja ekzisti - dum la baloto-kampanjo li ja komplete ridindigis la temon.

Jen la plej gravaj rezultoj:

1. La tutmonda celo: redukti la temperatur-altighon al 1,5 °C (pli reva ol 2 °C)
2. La 48 plej minacataj landoj rezignos pri fosiliaj energio-fontoj ghis 2050.
3. Redukti la karbo-bruligon.

4. Instali komunan oficejon en Washington por konsili kio eblas; kaj meti platformon pri realigitaj projektoj pro pli rapide antaŭeniri.

5. Tutmonda datenbanko pri la atingataj realigitaj pashoj.

6. Inter 2020 kaj 2025 chiuware investi 100 miljarde USD-ojn, inkluzive da fonduso por malriĉaj landoj.

(lau AFP/DPA, Bad. Ztg. 2016-11-26)

Komento AVE/mw: Do, ni vidas, ĉu „oni“ iros laŭpase.

2016-11-24 Klimata kalkulado - kiom pezas 1 automobila vojaĝo ?

Ni ĉiuj scias, ke fosilia automobilo konsumas oksigenon, kaj sekve eligas karbondioksidon (CO₂). Sed estas malfacile imagi kiom tio gravas por la klimato. Mi trovis la jenan ekzemplon - rondigita kalkulado:

Familio vojaĝas de Freiburg, Germanio al Genua, Italio tien kaj reen, kaj la auto bezonas 80 l da benzino.

El 1 l benzino rezultas 2,4 kg CO₂, do entute 200 kg benzino, kiu egalas al 100 kubaj metroj da CO₂-gasoj.

Ĉar la maksimuma celo de klimataj traktatoj estas 2 ppm, ni imagas, ke tiuj 100 m³ estas dilutataj al 2 ppm (2 partoj en miliono da partoj da aero-molekuloj), sekve 2 m³ CO₂ en miliono da m³ da aero.

Do, en 50 milionoj m³ la koncentriteco da CO₂ altiĝis je 2 ppm.

Bonvolu imagi la 50 mio m³ - kaj pripensi, ke la aero-premo (au kvanto) iĝas ĝis nulo en alteco de 250 km; tio signifas, ke finfine la CO₂ el tiu vojaĝo (80 l da benzino) distribuighas en volumeno de 1500 m³.

Por pli facile imagi: tio egalas al aero-kolumno ĝis la fino de la atmosfero super surface tereno de 6000 kvadrataj metroj (m²).

Kalkuli pri tuta Germanio (357.200 km²), kie troviĝas 45 milionoj persono-automobiloj, rezultas, ke po unu automobilo eblas plenigi kolumnon de 8000 m².

Do, ni vidas, ke ni multfoje vivas super la ebleco de la naturo.

(lau Otto Woehrbach, semajnfina magazino, p. III en Bad. Ztg. 2016-11-19)

Komento AVE/mw:

Kompreneble tiu kalkulo ne entenas la fakton ke arboj enspiras CO₂ kaj produktas oksigenon; sed ankaŭ ni homoj kun fornoj au hejtiloj kaj la bestoj adicie elspiras CO₂-on. Do, necesas redukti la uzon da fosiliaj fueloj.

Jam nun ni spertas la efikojn de la forceja efiko de altiĝita CO₂ (nuntempe mezume jam super 400 ppm): altiĝita temperaturo tutmonde, kion montras la sekva informo:

2016-11 Tro-uzo da akvo-resursoj, sekeco, degelanta glacio, altiĝitaj temperaturoj:

Nuntempe en pluraj landoj pli kaj pli monacas la homojn sekeco: Irano*1, Hindio, Bolivio, Kalifornio - kaj kompreneble en pluraj afrikaj landoj.

En kelkaj landoj oni klopdas pli efike uzi la akvon. Ekz-e mi legis pri Ladakh*2 en Himalajo, kie nuntempe pli rapide degelas la glacheroj, sed eblas re-glaciighi la fluantan akvon en malvarma pro ombro tereno. Tiamaniere teni la akvon ĝis la somero.

Parte temas pri tro-uzado da sen-sala akvoresursoj, parte pri klimata efiko, parte pri la El Niño kiu ĉi-foje kaŭzis pli grandan efikon ol kutime. Ni esperas, ke la El Niño nun finiĝas, kaj la situacio plibonighas. Sed dum CO₂ pliighas, ni devas preparighi al pli gravaj vetero-troigoj: tajfunoj, inundoj, arbaro-incendioj.

*1) lau Martin Gehlen, Bad. Ztg. 2016-10-26, p.3)

*2) Recenzo en Bad. Ztg. 2016-10-21, p.13, pri la libro „Am achten Tag“ (Je la oka Tago - aludante la biblian mondo-krean rakonton) de Gaia Vince, originale verkita en la angla.

2016-12-01 Makatea-atolo kaj la Tahiti-kolombo bezonas protekton

Temas pri insuleto en la suda Pacifiko, kie ankoraŭ troviĝas ne-tuŝitaj naturaj paradizoj, kaj unueca faŭno kaj floro kun alta biodiverseco. Ekz-e la sola regiono de la Tahiti-kolombo troviĝas tie.. Nun aŭstralia entrepreno SAS Avenir Makatea intencas ekspluati fosforon sur tiu insulo (eble simile al Nauru ...).

Adicie gravas la insulo ĉar ĝi estas pli alta ol 100 m, do malpli trafata de la

mar-nivela altigo. Bonvolu subteni la chi-rilatan peticion, direktita al Segolene Royal, ministrino pri medio de Francio, kaj al Edouard Fritch, la prezidento de franca-polinezio:

Ankorau mankas subskriboj por atingi 150.000:

<https://www.regenwald.org/petitionen/1075/bitte-unterschreibt-rettet-die-oekologische-arche-noah-im-pazifik?mtu=194437649&t=2776>

2016-10 Avokado kontraŭ Naturprotekto kaj Trinkakvo en Meksiko

Nuntempe pli kaj pli shatas la salubran frukton Avokado, kiu donas multaj vitaminojn kaj esencajn nutrajhojn - kaj povas anstataŭi buteron, kaj simile.

Por produkti chiam pli ekz-e en Meksiko oni forhakis grandskale praarbaron en naturprotekta zono en la alta tereno de la federacia ŝtato Michoacan - chiujare ch. 3.000 hektaroj. Aktuale estas 134.000 ha sub Avokado-plantejoj. Krome la uzataj pesticidoj eniras la trinkakvon.

(laŭ Denis Duettmann, Bad. Ztg. 2016-09-01, p.17)

==

2016-10-27 CETA - komento de Sven Giegold, MEP Verduloj/Regionalistoj
la ĉefa kaŭzo estas la arbitraciaj kortumoj. Pri tio juĝu la EU-kortumo.
Ne necesas minaci demokratiajn decidojn - ekz-e malfavori fumado-reklamon.
Sed necesas plibonigi la internacian merkaton:
redukti la limajn doganojn, egaligi teknikajn normojn

==

2016-10-25 Subteno financi studadon pri informadiko de esperantisto
Alphonse Waseka en Goma, DR Kongo, uzas Esperanton por plibonigi la evoluon en sia regiono. Li subtenas nian agadon en Kalima, kaj mem organizas subtenantojn por pluraj ge-junuloj en lernejo kaj studado. Lia agado estas per-Esperanto por-Esperanto.
www.verduloj/SBV-Goma_AVE.htm

2016-10-25 Nova retejo por la filmo pri Wangari Maathai
Se vi ancorau ne havis ŝancon vidi tiun filmon - subtitolita en Esperanto kaj en la angla originalo kaj en la franc-lingve parolita:
www.les-amis-de-wangari-maathai.ouvaton.org/eo/

2016-10 Kampanoj utilas naturan rearbarighon (FMNR)
World Vision subtenas (Farmer Managed Natural Regeneration), kiu utilas la restantaj radikojn en la grundo kiuj estas flegataj por denove krei arbojn. Ghi estas uzebla ech en dezertaj regionoj. Intertempe en 20 landoj re-kreskis arbaroj.
En la angla - WVI estas organizata de kristanoj, sed la subtenoj ne rilatas al religio, kun ligiloj al kontinentoj kaj landoj: www.wvi.org

2016-10 Alpo-Konvencio protektas grundon, akvon, bestojn kaj homojn
Aparte gravas la apliko-terenoj, jen la retejo en 5 lingvoj: www.alpconv.org

2016-10 Ecodefense.ru kaj Memo.ru estas estis nomumitaj „eksterlandaj agentoj“
Tiuj tradiciaj civil-sociaj organizajhoj tamen agadas. Ili verkas en la rusa.
Bedaurinde la ŝtato ne shatas tiajn organizojn, kiuj informas pri ekologiaj temoj (atomenergio ghis verdajhoj en loghdistriktoj); kaj pri Homaj Rajtoj kaj historia vero.

Pri „Memorial“ <https://eo.wikipedia.org/wiki/Memorial>

==

2016-10-10 Litovio ighas pli verda

En la unua proporcia baloto por 70 seĝoj en la parlamento la kunagantaj Kampanoj kaj Verduloj ricevis la plej multajn voĉojn (21,9%).

Je la 23-a okazos la dua voĉdonado por la rekte elektitaj 71 parlamentanoj.

Ni esperas ke ankau Litovio ighos pli verde, simile al la najbaraj baltaj landoj.

www.zeit.de/politik/ausland/2016-10/litauen-parlamentswahl-opposition-fuehrung-erste-

runde

2016-10 Malgrau la referendumo en Litovio oni planas nova(j)n atomreaktoro(j)n
Je la 14-a de Oktobro 2012 la civitanoj voĉdonis kontraŭ la planoj konstrui novajn
atomreaktorojn apud Visaginas je la limoregiono al Belariusio kaj Latvio (proksime de
la haltigita atomreaktoro Ignalina).

Tamen - intertempe la registaro planas konstrui la reaktorojn kune kun Hitachi
(supozeble la saman tipon kiel en Fukushima).

Pli pri tio en wikipedia.org (serĉu Visaginas).

Kaj jen pri la referendumo de 2012:

<http://www.greenpeace.org/international/en/news/Blogs/nuclear-reaction/pro-nuclear-mudslinging-in-lithuanias-nuclear/blog/42350/>

--

2016-09-29 Situacio ĉirkau Fukushima kaj pri aliaj japanaj reaktoroj
Dankon al s-ano HORI Jasuo kiu tradukis la detalo-richan prelegon de s-ro Ito, kiu
tut-japane agadas kontraŭ atomenergio.

Bedaurinde la tiroidaj kanceraj je infanoj altiĝas, ktp.

La prelego troviĝas sur nia retejo:

verduloj.org - aktuale en la unua pagho - ankau sub „Dokumentoj“ je „Energio“.

==

2016-09-28 peticio de Bellona al Litovio por belarusaj medio-aktivistoj
sur la retejoj de la Europa Verda Partio (europeangreens.org) kaj la norvega medio-
protektita organizado Bellona.org legeblas, ke Litovio maldece malakceptas la viziton
de aktivistoj Tatyana Novikova kaj Nikolai Ulasevich, kiuj estis invitataj partopreni
la konferencon „Lithuania - Belarus: Nuclear Neighborhood“; ĉar Litovio planas
konstruigi atomreaktoron (de japana Hitachi) apud Visaginas.

Kaj vi certe scias, ke ankoraŭ nun post 30 jaroj multaj homoj en Belarus suferas de
la Chernobyl-katastrofo

Jen la pagho de Bellona kun la ligilo al la peticio (de AVAAZ):

<http://bellona.org/news/nuclear-issues/2012-09-belarusian-anti-nuclear-activists-blacklisted-by-lithuanian-government>

Je la fino de la teksto vi trovas:

„Sign a petition urging the Lithuanian government to lift the persona non grata
status from Novikova and Ulasevich [here](#) „ bonvolu klaki ĉi-tie.

==

2016-09-21 **Torio-Atomreaktoro - ĉu pli sekure ?**

Jen nova filmo (98 min) de Europa TV „arte“ - kiu (tro) bele priskribas la evoluon de
atomenergio kaj aparte tiu de torio-atomreaktoro. Torio estas trovebla en sufiĉe
granda kvanto tutmonde; nuntempe ĝi estas kvazau rubo, je ekspluatado de kelkaj
Raraj Teroj, kiel Neodym (uzata por permanentaj magnetoj).

Lau fiziko ĝi estus de si mem sekura, kaj oni konstruus malgradajn energi-centralojn
kies ab-varmo oni povus uzi por industrio au en malvarmaj regionoj - sonas bele.

Jen la ligilo al la filmo:

(de) <http://future.arte.tv/de/thorium>

(fr) <http://future.arte.tv/fr/thorium>

Aliflanke restas la riskoj terorismo kaj plimultigo de shtatoj kun atombombo, jen la
ligilo en la germana: www.bund-rvso.de/thorium-reaktor-fluessigsalz-klein.html

= =

2016-10-14/16 okazos Monsanto-Tribunalo en La Hago (NL)

Ekocido estas nova termino: murdi ekologian sistemon - ĝi devus eniri en la
katalogon de krimoj - ĵughebla de la Internacia Jughkortumo en La Hago.

Internacia jughistaro esploros ĉu kaj kiamaniere Monsanto detruas ekosistemojn kaj
ankau minacas la sanon de homoj: (en 10 lingvoj) <http://www.monsanto-tribunald.org/>
Ili prezentos la kunsidojn dumtempe; kaj petas subskribojn kaj donacojn.

(Informo de Franz & Birgit Alt: www.sonnenseite.com)

= =

2016-08-31 Selous Besto-Rezervejo minacata de minejoj kaj industrio. WWF petas subteni mesaghon al la nova prezidento de Tanzanio, por savi la terenon Selous por la elefantoj ktp, kaj ankaŭ por la homoj kiuj vivas de la turismo. Se Tanzanio fordonus la terenon por la mineja industrio, ghi ne nur perdus la bestojn, sed ankaŭ la akepton de UNESKO ke Selous estas tutmonda heredajho. Bonvolu subteni la peticion: <https://makeyourmark.panda.org/selous>

2016-08-31 CETA & TTIP la sama afero

la franca registaro kaj ankaŭ la germana ministro pri ekonomio, Gabriel, nun malfavoras TTIP (Trans-atlantika Merkato kaj Investo-Partnereco), kiu rilatas inter Usono kaj Eŭropo. Sed la kontrakton pri CETA (Ampleksa Ekonomia kaj Merkato Kontrakto) kiu rilatas inter Kanado kaj Eŭropo ili akceptis (sen paroli pri tio). Sven Giegold, verda MEP kaj specialisto pri ekonomio kaj financoj (antaŭe aktivis che ATTAC) atentis, ke CETA malfermos la pordon por TTIP, ĉar multaj usonaj konzernoj havas filiojn ankaŭ en Kanado. Li skribis: (de & en): <http://www.sven-giegold.de/> „CETA sekvas la saman principon kiel TTIP.

Demokratio kaj jur-shtateco estos subjungataj sub ekonomiaj interesoj de konzernoj. Necesas korekti ĉiujn ĉapitrojn de tiuj kontraktoj, tiel ke parlamentoj kaj civitanoj restas decido-rajtigitaj - sen la minaco ke sekvos gigantaj pun-pagoj al la konzernoj.“

Oni jam vidis tian en Urugvajo, kie la tabak-konzerno Philip-Morris postulis monon pro malpermeso varbi por cigaredoj. Feliche ĉi-foje la firmao malsukcesis. (Lingvoj de, en, fr, ca): https://de.wikipedia.org/wiki/Philip_Morris_gegen_Uruguay

2016-08-31 Apple devas pagi impostojn

Giegold ankaŭ esploris la mekanismon kiamaniere Apple k.a. sukcesas eviti la pagon de normalaj impostoj (kion devas pagi aliaj firmoj). Li bonvenigis la altan post-pagon flanke de Apple pro ne-pagitaj impostoj en Eŭropo. Pli pri tio ankaŭ sur lia retejo: <http://www.sven-giegold.de/>

2016-08-30 Svisio kontraŭas travideblon koncerne radioaktivaj emisioj

Greenpeac postulis publikigon de la mezur-valoroj kiaj kaj kiom da radioaktivaj isotopoj elflugas el la kamentubo de la atomcentralo Leibstadt, je la svisa limo ĉe la Rejno. Ekzistas legĥo pri publikigo da datenoj, tamen administra jugĥejo en St. Gallen subtenis la opinion de la atom-firmao, ke la datenoj ne estas publikigendaj. Certe vi scias, ke ĉiu atomcentralo havas altan kamentubon, por ellasi radioaktivajn gasojn, kiu aparte liberighas dum la shangho de la brul-stangoj; kaj tiam en alta dozo. La centraloj rajtas averagĥi la emisiojn dum longa tempo (eble semajno), tiel ke la pinto de emisioj estas for-tranchita statistike.

Se vi enspiras dum tiu pinta tempo (depende la veter-kondicho) via risiko malsanighi je kancero estas pli alta.

Greenpeace nun protestas antaŭ la plej alta jugĥejo de Svisio.

2016-08-31 Palm-oleo detruas la praarbarojn en Malajzio kaj Indonezio.

Oni povas uzi regionajn alternativojn, kaj fakte ni devus uzi malpli da tiaj oleoj; kion diris WWF. <https://panda.org>

Fakte grandskale oni produktas bio-dizelon ankaŭ el palm-oleo.

Ekzistas alternativo - uzi la uzitan kuirejo-oleon, kaj transformi ghin en bio-dizelon. Ankaŭ la graso de mortigitaj bestoj, kiun oni ne uzas, taugas por tiu celo.

= =

2016-08 **Abeloj ne eltenas Neonikotinoidajn Pesticidojn !**

Same kiel en Germanio, oni vidas la malbonan efikon de tiaj pesticidoj kontraŭ abeloj - kaj similaj insektoj. Jen filmo de BBC pri tio en la angla:

<http://www.bbc.com/news/science-environment-37099809>

Jen pli detala informo pri la kunagado de diversaj minacoj kontraŭ abeloj:

(en la germana) <http://www.umweltinstitut.org/themen/landwirtschaft/bienen/gruende-fuer-das-bienensterben.html>

Jen en Vikipedio, supozeble la germanlingva versio estis verkita de industri-dependa aŭtoro; en la angla pli sendependa - aŭ pli natur-afabla - verkisto. Versioj en ĉ. 14 lingvoj, sed ankoraŭ ne en Esperanto. Jes ankau Vikipedio estas hom-farita teksto, kaj mankas tute neutrala institucio, kiu kontrolas la enhavon:

<https://de.wikipedia.org/wiki/Neonicotinoide>

= =

2016-08-16 Agroforestry - kombini arbaron kun nutrajho-produktado en sekaj regionoj. Kiu vivas en tre seka regiono, altestimas la pluvon kaj roson (humidecon de la aero, kiu faletas nokte). Arboj ankau altiras la nubojn, pli ol ili membezonas, kaj transdonas la surpluson al pli foraj de la maro regionoj.

Mi ja scias, ke ekzistas regionoj, kie en Kalifornio, kie la montaro bremsas la nubojn, kaj kie El Ninjo kuzas gigantajn arbar-brulojn - evidente natura fenomeno, ĉar kelkaj arbo-semoj bezonas la fajron por ek-ghermi.

Tamen, kie oni forhakis arb(ar)ojn ne pensinte pri la re-arbarigo, tie oni spertas la mankon da akvo - la filmo pri Wangari Maathai montras tion draste !

Ekzistas praaj kaj pli modernaj metodoj.

Ekze- FMNR (farmer managed natural regeneration) - vi trovos detalan artikolon en la angla, kaj malpli detalan en la germana, je: en.wikipedia.org

Tie vi ankau trovas aliajn ligojn.

Kompreneble oni flegas „sovaghajn“ kaj „frukto-portantajn“ arbojn, ĉar la miksajho gravas en la naturo.

Simile en la angla kaj hispana: <https://en.wikipedia.org/wiki/Ecoforestry>

= =

2016-08-14 Iomete pri nutrajho-kodoj kaj informoj por konsumantoj

angla vortumo: Price Look Up code - PLU

Sur fruktoj kaj legomoj venditaj nepakite estas identiga numero, t.e. la internacia kodo *PLU (Price Look Up)*.

Ghenerale temas pri 4-cifera kodo, kiu komencas per “3” aŭ “4”. Temas pri frukto aŭ legumo kultivita laŭ konvencia metodo ... **kun** sterkoj kaj pesticidoj.

Se la numero estas 5-cifera kaj komencas per “9”, temas pri **biologia** produkto.

Se la numero estas 5-cifera kaj komencas per “8”, temas pri **OGM, produkto genetike modifita**.

Atentu pri la fakto ke tiu kodo ne estas devigata en Nord-Ameriko !

Ekzemple : la etikedo de konvencia banano estas 4011, de **biologia** banano **9**4011 kaj de OGM-banano 84011.

(pri PLU en en pluraj lingvoj): <https://de.wikipedia.org/wiki/PLU-Code>

--

Kodoj pri ovoj kaj informoj pri diversaj bestodevenaj nutrajhoj, kiuj montras la devenlando, tenado-kvalito (en kagho, en domo, sur ekstera tereno) (en la germana):

<http://www.tierschutzbund.de/produktlabels.html>

--

Konsumanto-informoj pri fishoj - laŭ la kapto-regiono kaj kapto-metodo Verdpaco eldonis informileton, ankau kiel aplikajho:

(en la germana) <http://www.greenpeace.de/fisch>

(en aliaj lingvoj) <http://www.greenpeace.org/fish>

(la plej grava siglo pri fishoj, en multaj lingvoj): <https://www.msc.org/>

--

Se en via lando ekzistas similaj kodoj, bonvolu sendi la koncizan informon por krei „Konsiloj por Konsumantoj“ sur nia retejo, kie jam trovighas pluraj informaj tekstoj: <http://verduloj.org/dokument.htm> kaj <http://verduloj.org/energio.htm>

(dankon al Germain Pirlot, kiu semis tiun informon)

= =

2016-08-06 Hiroshimo kaj Nagasaki atentigas - for la atombomboj !
La 2 Atombomboj sufichis por mortigi tuj au en mallonga sekva periodo pli ol 230.000 homoj. Bedaurinde la politikistoj de tiuj landoj kiuj havas atombomboj, ne volas rezigni pri tiu gigantega armilo. Oni esploras malpli grandajn A-bombojn - freneze.

2016-08-06 Brazilo perdadas akvon
Esploristoj (dank al aviadilo de Petrobras) trovis ke la humideco kiun altiras de la Atlantiko la praarbaro de Amazonio similas al giganta en-aera riveraro, kiu fakte humidigas ankaŭ la sudon de Brazilo. Fakte la Anden-montaro redirektas la fluon de tiu humideco-rivero.

Pro la daŭra malarbarigo (en 1 minuto oni forhakas areon en grandeco de 1 pied-pilkoludejo por pashti bovojn, produkti sojo-fabojn au ekzotikajn fruktojn por eksporto) tiu akvo cirkulado ne plu tiom funkcias kiel antaŭe.

Finfine multaj regionoj - komence en la sudo - de Brazilo dezertighas, la rivero Francisco ighas rivereto, ktp. kaj trinkakvon oni devas alporti per kamiono.

Simile kiel Wangari Maathai* ekzistas homo - la fama fotisto, Sebastiao Salgado, kiu fondis la „Instituto Terra“ enkadre de tiu li rearbarigis la regionon, subtenas agrikulturistojn vivi kun la arboj, kaj instruas pere de seminarioj.

Pri li kaj lia Instituto Terra vi trovos informon en Vikipedio - multon en la germana, bazan informon en Esperanto.

Tiu filmo (en la germana) raportas pri la temo Akvo kaj Brazilo:

<http://www.zdf.de/ZDFmediathek/kanaluebersicht/1457670#/beitrag/video/2767884/Brasilien---ein-Land-trocknet-aus>

kaj koncize kun teksto kaj filmeto en 2 minutoj:

<http://www.zdf.de/planet-e/wassermangel-durch-misswirtschaft-in-brasilien-vor-den-olympischen-sommerspielen-44591184.html>

*) vi certe jam spektis la filmon pri Wangari Maathai - subtitoligita en Esperanto - <http://les-amis-de-wangari-maathai.org/le-film-taking-roots-sous-titre-en-esperanto/> jen konciza informo pri la filmo en diversaj lingvoj: <http://verduloj.org/welcome.htm>

= =

2016-06-06 Siberiaj arbaroj brulas grandskale
Bedaurinde la registaro ne sufiche zorgas pri preventi tion, ekz-e instali regionajn shtatajn instituciojn kiuj kontrolas la uzadon de la arbaroj - kiaj ekzistis en Sovetunio.

(lau Khalimat Tekeeva, greenpeace.org > serchu „wildfires“)

Kontraste aliloke pluvachas - ech en la modera okcidenta Europo mortis homoj kaj detruighis stratoj kaj domoj pro inundoj.

--

2016-06-08 Tago de la Oceanoj & Batalado kontraŭ plastajhoj en la maroj
Pluraj asocioj batalas por preventi/protekti la oceanojn kontraŭ plasta rubaĵo.

En pluraj havenoj oni invitas la fishistojn deponi la kolektitajn plastajhojn senkoste. En Brazilo ech temas pri afero de la Olimpiko.

Chiukaze la plastajhoj endangherigas, ofte kausas tro fruan morton je maraj birdoj kaj diversaj fishoj, ktp.. Sciencistoj eksciis, ke la mikro-plastajhoj - muelitaj plastajhoj kaj el haut-purigaj produktoj - damaghas la kreskadon de fishidoj.

(Vidu: verduloj.org/akvo.htm)

La 8-a de Junio estas la Internacia Tago de Oceanoj. Ni devas konscii ke ankaŭ la

klimata krizo ghenas la marojn, ekz-e koraloj mortadas pro tro alta temperaturo, kiu ankau kauzas la altighon de la mara nivelo. Tie ne eblas skribi pri la kompleksega interrilato de la vivo kun la maroj.

Pli - ekz-e: futureocean.org (en la germana kaj angla)

Amikoj de la Tero internacia: foe.org kaj foei.org (en la angla, franca, hispana)

De Renee Triolle mi ricevis deklaron de la Oceana Nacio (trad. En Esperanton) - sed ne scias, kiu jam subskribis ghin.

==

2016-05-15 Chu minado al nafto kauzis la arbofajregojn en Alberta/Kanado ?
Kommento AVE/mw, ke la giganta subchiela elfosado kaj preparado de la nafto-sablo (gudro-sabloj) kostas grandan kvanton da akvo; kiu supozeble mankis por la arboj. Arbaro fajregoj estas naturaj okazajhoj, sed tamen kelkfoje sekvo de la homa agado.
==

2016-04-17 Peticio - Internacia Lingvo por aviado

Iu (Elisabeth Lambert) sendis tiun petleteron :demando da shangho da lingva politiko en aviado. Angla trudita en 1951 en aviado povas esti danghera. Dankon por via subskribo kaj diskonigo ech al ne esperantistoj. (**elisabeth lambert** <elisabeth1949@outlook.fr>)

[Demande de changement de politique linguistique dans l'aviation](#)

jen la rekta adreso: http://www.petitions24.net/embed.php?petition_id=142930

(dankon al Ramon)

==

2016-04 Filmo pri la malsanigaj restajhoj de Uranio-ekspluatado en Sudafriko:
jen la prov-filmeto: www.ujuzi.de/legacywarnings

==

2016-03 Chu Sudafriko bezonas pli da nuklea energio ?
Koeberg (2 x 980 MW) proksime de la Tablo-monto gxis nun estas la sola nuklea centralo en Suda Afriko, je 40 km de mia hejmo en urbo de preskaux 4 milionoj. Gxi ekaktivis en 1984 kaj uzas francan teknologion. Gxi do estis konstruita kune kun francoj malgraux la tiama bojkoto kontraux apartismo.

Jes, nia registaro volas konstrui plie 9600 MW da nuklea elektroproduktado, malgraux la fakto ke elektro el la renoveblaj energioj kostos jam nun malpli ol tio el karbono. La kostoj de nuklea elektro plejversxajne estos multe pli altaj, kaj la financministro ne havas la monon.

Do, mi opinias ke tiuj planoj ne realigxos. Sxajnas, ke ili bazigxas sur interkompreno de nia prezidento Zuma kun la rusa prezidento Putin.

Ankaux jes, estas kelkaj afrik-naciaj politikistoj kiuj volas 'fortajn landojn', do kun nuklea energio (kaj eble ecx pli?). Necesas edukado kaj pri la sekvoj de nuklea energio, kaj pri 'forteco' en la 21a jarcento, eble ankaux kontraux "vireca naciismo". (dankon al Harro von Blottnitz)

==

2016-03-19 Sovaghaj kaproj detruas ekosistemon
Ili estis alvenigitaj antau pluraj jaro de homoj al la baleara insulo Vedrano. Sed la ekosistemo sur malgrandaj insuloj - au ech kontinentoj kiel Australio - estas ege ghenataj de invadantaj bestoj (neozooj) au plantoj (neofitoj).
Mi alkrochas ekzemplodonan artikolon pri kaproj, kaj dankas al Gereon.

2016-04 Japanio finas la elektro monopolojn
Ekde Aprilo 2016 ni povas mem elekti elektrokompanton.

Espereble tiam komencighas konkurenco inter atoma/nuklea-elekto kaj la alternativojn.

Jen 116 bonaj argumentoj por fini la atomenergion:

en 10 lingvoj: (de, en, eo, es, fr, hr, no, pl, ru) <http://100-gute-gruende.de/index.xhtml1>

(dankon por la japana informo al Goro)

= =

2016-02-26/28 Kongreso de IPPNW - okazis

Fukushima 5, Tchernobil 30 jaroj

Dum Japanio emas kashi la problemojn ili kreskas.

Ankau en Ukrainio kaj Europo restas radioaktivaj isotopoj de la eksplodo, kaj sanproblemoj.

Jen la retejo - kun arkivo de la antauaj kongresoj - en la germana kaj la angla:

<http://www.tschernobylkongress.de/>

Jen la kompleta programo de la kongreso: <http://www.chernobylcongress.org/>

kaj multaj rilataj ligiloj - poste venos la dokumentoj de la paroladoj.

- - -

korekto:

2016-01 FAO dedichis la jaron 2016 al la fabacoj / legumenoj / (gush-semoj) - pizoj, faboj, lentoj, ktp.

Tiuj plejparte povas anstataui viandon - <http://www.fao.org/pulses-2016/about/key-messages/en/>

(la pagharo de FAO estas legebla en la 6 oficialaj lingvoj de UN)

Do, semu, se vi havas ghardenon au kampon; kaj trovu bonan recepton (ankau sur la FAO-pagharo).

Fabacoj (au legumenoj) ankau gravas en la agrikultura cirklo.

(dankon al Wolfgang kaj Leo por la terminologiaj konsiloj)

= =

2016-02-19 peticio kontrau Privataj Arbitraciaj Jughkortumoj (TTIP, CETA, ...)

Europa Movado „We-Move / ni movas“ kolektas subskribojn por tiu celo.

La retejo estas en la jenaj lingvoj: de, en, es, fr, it)

<https://www.wemove.eu/>

= = =

2016-02-11 Klimata krizo videbla en la temperaturo kaj malapero de lagoj

La dua plej granda lago en Bolivio, Poopo, sekighas.

Kauzoj estas la troa uzado de la akvofontoj, kaj El-Ninjo.

[http://www.la-razon.com/sociedad/Gobernacion-Oruro-soluciones-desvanecido-](http://www.la-razon.com/sociedad/Gobernacion-Oruro-soluciones-desvanecido-Poopo_0_2399160147.html)

[Poopo_0_2399160147.html](http://www.la-razon.com/sociedad/Gobernacion-Oruro-soluciones-desvanecido-Poopo_0_2399160147.html)

Same kiel la Grandaj Lagoj en Usono, ankau la Lago de Konstanco montras plialtighon de la temperaturo, po duona grado dum chiu el la pasintaj jardekoj.

Kelkaj lagoj malvarmighis, char la glacheroj pli rapide degelas.

(lau S. Schilling, taz.de, 2016-01-08, p.9)

- -

2016-01-04 Hidrargo-eligoj je karbobruligo en varmo-kurentaj centraloj.

Esploro, mendita de la Verdpartia Frakcio en la germana parlamento montrighis: En

Germanio tiaj uzinoj eligas jare 7 tunojn da Hidrargo; kiun oni povus elfiltru

grandparte. Hg kauzas diversajn sandifektojn.

[http://www.gruene-bundestag.de/themen/umwelt/quecksilber-gefahrdurch-](http://www.gruene-bundestag.de/themen/umwelt/quecksilber-gefahrdurch-kohlekraftwerke_ID_4397671.html)

[kohlekraftwerke_ID_4397671.html](http://www.gruene-bundestag.de/themen/umwelt/quecksilber-gefahrdurch-kohlekraftwerke_ID_4397671.html)

- -

2016-02-12 En Moskvo la registaro ebenigis vendejetojn - sed plejmulto havis validajn legitmilojn. Chu tipe rusa ?

<http://www.khodorkovsky.com/the-night-of-the-bulldozers/>

la pagaro estas ankau en la rusa, sed tiun aktualan artikolon mi nur trovis en la anglan.

- -

2016-02-12 Legala imposto-fraudo flanke de IKEA

Se iu miras kiamaniere IKEA povis ighi tiom richa - krom la teknika ideo, temis pri la evito pagi impostojn.

Tiu-chi sveda meblo-konstruisto uzas la imposto-eblecojn inter la BeNeLukso-landoj, por redukti la impostojn. Studo, kiun mendis la Europa Frakcio de la Verdaj Partioj

kaj Regionalistoj, montris, ke ekz-e por Germanio IKEA evitis la pagon de 35

milionojn Euroj en la jaro 2014.

Ene de la lastaj 6 jaroj IKEA gajnis tiamaniere 1 miljardon Euroj.

Sven Giegold postulis ke la EU-Komisiono faru konkuro-leghan esploron pri tiaj imposto-fraudoj, ankaŭ flanke de aliaj konzernoj. Kaj malebligu ilin.

Jen la plena informo en la germana kaj en la angla:

<http://www.sven-giegold.de/2016/studie-belegt-milliardenschwere-steuervermeidung-von-ikea/>

= =

2016-01 FAO dedichis la jaron 2016 al la fabacoj / legumenoj / (gush-semoj) - pisoj, faboj, lentoj, ktp.

Tiuj plejparte povas anstataŭi viandon - <http://www.fao.org/pulses-2016/about/key-messages/en/>

(la pagharo de FAO estas legebla en la 6 oficialaj lingvoj de UN)

Dank' al Pierre - Mirejo informis - FAO provizis nin ankaŭ per la logotipo en Esperanto.

Do, semu, se vi havas ghardenon au kampon; kaj trovu bonan recepton (ankaŭ sur la FAO-pagharo).

Fabacoj (au legumenoj) ankaŭ gravas en la agrikultura cirklo.

(dankon al Wolfgang kaj Leo por la terminologiaj konsiloj)

===

2016-01-24 Atomenergio por la tuta mondo - ghis la sekva katastrofo ?

Kelkaj ŝtatoj opinias, ke atomenergio helpas al siaj landoj, kaj pro tio ili mendas atomreaktorojn, ĉefe de rusa au china produktado; ekzemple Bangladesĥo, Irano, Hungario, Slovakio, Pollando (estas nur elekto).

Eĥ se oni neglektas la riskon de granda katastrofo, tia teknologio ne estas daŭripova. Uranio estas limigita, eĥ se oni riskas la t.n. bredoron. Iam oni devas kashi multe da radioaktiva rubo; kaj dum la vivtempo de la atomreaktoro ghi eligas radioaktivajn gasojn - ĥu vi ne vidis ke atomcentralo posedas altan kamentubon ? Socia afero estas la dependiĝo de alia lando, ĥar nur malmultaj landoj posedas la teknologion.

Intertempe la regajneblaj energioj estas sufiche evoluitaj, ke ili povas konkurenci kun atoma au karba centralo. Krom tio ili donus multe pli da regionaj laborlokoj kaj la eblecoj evolui la enlandajn teknikajn metiojn.
